

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 6 (21), Junio 2006

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familio \$30; Regula \$20;
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

Dues are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

Kunvenoj:

Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas la kvaran mardon de ĉiu monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Bonvenon!

Nun oni certe rajtas diri, ke ankaŭ la sekvanta UK en Florenco estos pli ol 2000-kapa – pri tio jam informis informejo de LKK. Malgraŭ diversaj duboj pri forteco de nia movado, statistiko atestas pri stabila situacio inter la monda esperantistaro, eĉ pli – nia kvanto malrapide kreskas. Eĉ en nia venta (ne vanta) urbo kelkaj sufiĉe junaj personoj ek-interesiĝis pri IL, en animoj de kelkaj malnovaj adeptoj revekiĝis verdeco, en apuda ilinoja universitata Ŝampan-urbeto Filipino Bierfaristo (Brewer) fondis E-grupon. Kaj persone min mirigas senlaceco de nia sekretarino Gertrude Novak: ŝia sperto pliriĉiĝis post la vizito de sud-okcidenta regiono de... Mi invitas ŝin rakonti pri tio.

Laste okazis

Kiel volontulino de kvinopa teamo mi pristudis riverbestojn kaj akvo-kvaliton de la fama akvodistrikto *Pantanal*'o en Brazilo. Post tio, adiaŭante kolegojn-esploristojn, mi pasigis 5 tagojn en bieno-lernejo *Bona Espero*. En la brazila ĉefurbo min renkontis s-ro Giuseppe Grattapaglia kaj veturigis 250 km norden – al urbeto Alto Paraiso. Antaŭ 49 jaroj, kiam estis fondita la bieno, tie ekzistis nenio. Nur post la alveno de Giuseppe kaj Ursula (lia edzino) el Eŭropo ekevoluis tiu ĉi laŭdinda agado. El la tiamaj absolute primitivaj kondiĉoj kreskis, iom post iom, ĉio nune ekzistanta – akvo-kondukilo, konstruaĵoj, elektro-sistemo, plantaĵoj kaj, speciale, la lernejo, kiu efektive estas “vera hejmo” por 30 infanoj, kiuj ne posedus “hejmon” alimaniere. Giuseppe kaj Ursula iĝis iliaj “gepatroj!”



Ĉiutaga porinfana programo estas bone kunordigita: lunde-vendrede – stud-klasoj (9-17); sabato – purigtago; dimanĉe – ripozo kun amuzoj. En la lernejo manĝaĵo estas simpla, sed kaloriplena: ĝia plejparto originas de l'propra ĝardeno. Pro sia limigado la mon-spezoj estas atente planataj.

Ada, faka instruistino, mem estas lernantino de l'*Bona Espero*. Kvankam ĉiuj studobjektoj estas intruataj en la portugala, IL restas ĉefa dua lingvo por la loĝantoj de la bieno.

Dank'al klopodoj de ges-oroj Grattapaglia (ili vizitis nian Societon pasintjare, festante 100-jariĝon de *Rotario Internacia* en Evanstono), la bieno havas bonegajn rilatojn kun la komunumo de Alto Paraiso, ĝia urbestro mem estas fervora adepto de nia kara lingvo.

UTILAJ RET-ADRESOJ:

UEA – Universala Esperanto Asocio
<http://www.uea.org>

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)
<http://www.esperanto-usa.org/>

Free Esperanto Course on Internet
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course
<http://www.mintex.demon.co.uk/esp/viva/angla/index.htm>

Internacia televido en E-o
<http://internacia.tv>

Reta senpaga enciklopedio
<http://eo.wikipedia.org>

Esperantic Studies Foundation
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

Pola Radio en Esperanto:
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

27an Junio – Inna Vozlinski, nia gastpreleganto el Nova Ĝersio, rakontas pri sia vivo kaj sperto en Esperantio

25an de Julio – kunportu viajn ŝatatajn verkojn (original aŭ traduk.) por literatura vespero

22an de Aŭgusto – interŝanĝo per sperto, akirita somere

Antaŭ 35 jaroj, la 30an de Septembro 1971, estis oficiale registrita “Esperanto Society of Chicago”. Salutoj estas bonvenataj!!!

Nuntempe la bieno enhavas grandan monton, laĝeton, akvofalon, sed la ĉefaj klopodoj estas koncentrigataj je edukado kaj prizorgado de l'infanoj kaj konstanta evoluo de Esperanto tie ĉi. Kiam permesos pagebleco, oni provas pligrandigi legom-bedojn kaj plilarĝigi kapaciton de l'ekzistantaj konstruaĵoj. Sed..., bedaŭrinde la brazila ŝtato havas milionoj de forlasitajn infanojn kaj la registaro povas rekompenci nur 5% de bezonataj elspezoj.

Atenton: dezirantoj povas kontribui direkte al la Bona Espera konto ĉe UEA – “bone-z”.

Gertrude NOVAK

P.S. Por eksenti etoson de la fora lando estas proponata poemo de brazila akademiano Geraldo Mattos *La nokto*:

La nokto sorĉas min per la mistero
de flustra kaj multvoĉa varma kvero
miksita kun palpebla mut'.
Silentas besto kaj vortpova homo,
dum ŝtono kreve, floroj per aromo
impete ŝtormas per balbut'.
Kaj ili plendas, krias kaj trumpetas
kaj fonon de lasciva ritmo retas
por la orgasmoj de la nud'. (*La red.*)



Membraro de la Societo kaj redakcio de la Bulteno tutkore salutas **Roberton** kun **Sapideh** okaze de ilia geedziĝo! Sanon kaj feliĉon al novbakita familio! Ni atendas pligrandiĝon de nia E-anaro!


Esperanto en Usono

Gazeto *Buffalo Grove Countryside* en du numeroj raportis pri nia samideano Ben Etkins, kiu jam dum 30 jaroj ĉiutage skribas leterojn, nun ankaŭ en nia kara lingvo. Gratulojn al propagandisto de E-o!

La 21-24an de Julio, la multkultura kaj pluretna urbo Novjorko gastigos jaran kongreson de ELNA, kies temo estos *plurlingvismo*. Se vi amas Novjorkon, vi amos la ELNA jarkongreson en Novjorko! La Granda Pomo troviĝas survoje al UK en Florenco, al kiu jam aliĝis pli ol 2000 e-istoj el 61 landoj. La ELNA kongreso okazos tuj post Nord-Amerika Somera Kurso en Vermonto (3-21an de Julio). Vizitu: <http://www.sit.edu>.

En la sekvanta numero de SALUTON! informos vin pri E-gastoj, konatigos vin kun novaj viziti(a)ntoj de nia E-Societo kaj rekomendos kelkajn interesajn E-librojn, eldonitaj en Esperantio.

Ĝis la sekvanta numero, vin kore salutas

 araneoesp @ yahoo.co.uk